

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

NIAJ PLANOJ

☛ ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

* Regulaj Klasoj en sabato: Klaso por legado de "Tra dezerto kaj praarbaro", Klaso por legado de "Vivo de Lanti" / Jokohama Salono/ Rudimenta kurso.

* Regula Klaso en merkredo.

RUDIMENTA KURSO KOMENCITA

Rudimenta Kurso komenciĝis en okt. 27 (daŭranta ĝis jan. 26), en la supra loko. S-ro IWAYA Mituru gvidas unu kursanon, per "Hanako lernas Esperanton" kiel lernolibro.

HAMA-RONDA VESPERO NOVEMBRA

*nov., 17, 17h00-19h00, ĉambro 604

S-ro NANBA Humiharu rakontos pri sia vojaĝo al Saĥaleno, Rusio, kaj ges-roj DOI parolos sian sperton en ĉi-jara vjetnama UK, ĉefe kiel helpantoj.

☛ EKSTER LA REGULA KUNVENEJO

ZAMENHOF-FESTO

EN LA URBO ODAWARA

*dec., 15, en la urbo Odawara

La Zamenhof-Festo de la rondo en Gubernio Kanagawa okazos en la "Internacia Ĉambro" de la urbo Odawara, gastigate de la Esperanta Klubo en Odawara. Inter alie estos publika prelego de juna verkisto MAMIYA Midori pri "mi kaj Esperanto".

TIEL OKAZIS

INTERNACIA FESTO EN AŬTUNO

*okt., 20 kaj 21, en la parko "Zoo-no-hana"

Ni partoprenis ekspozicion, kadre de la "Jokohama Aŭtuna Internacia Festo 2012", en la parko apud la haveno de Jokohamo. Tie ni ekspoziciis, kia estas esperantista vivo, kaj disdonis entute 360 flugfolion al interesitoj.

HAMA-RONDA VESPERO OKTOBRA

*okt., 20, 17h00-19h00, ĉambro 709

Temas pri "inicado al la esperanto-kursoj". Estis serio da mallongaj prezentadoj, kiel jene.

- (1) S-ino DOI Ĉieko: kiel enkonduki kurson per la lernolibro "Hanako lernas Esperanton" en kurso por urbanoj, kaj kiel (lude) gvidi lernantojn en lerneja klubo, kun aĝo inter 12 kaj 15.
- (2) S-ro IWAYA Mituru: el sia sperto de gvidado
- (3) S-ro KOYAMA Takesi: el sia sperto de gvidado en urbo Atugi, kie li loĝas
- (4) S-ro SIBAYAMA Zyun'iti: pri la nove redaktata lernomaterialo kun ekzercoj, iniciatita de Japana Esperanto-Instituto
- (5) S-ro DOI Hirokaz: gvidmaniero pri praktika Esperanto al hotelistoj k.a., okaze de la 2007-a UK en Jokohamo, kaj ankaŭ prezento de materialoj pri Esperanto en grupo de civitanoj.



■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti
 ■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
 ■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
 ■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

ESEOJ

Tri Zamenhofaĵoj en Vieno

Mizro Iwaya

L. L. Zamenhof studis oftalmologion/ okulologion dum duonjaro en Vieno ĵus antaŭ la eldono de La Unua Libro. Tiel intiman rilaton havas Zamenhof kaj Vieno. Pro tio aŭ ne, Vieno havas Zamenhof-rilatajn objektojn: Internacia Esperanto-Muzeo, busto de Zamenhof kaj Zamenhof-Strato. Mi vizitis tiujn tri lokojn en tiu ĉi somero.

1. Internacia Esperanto-Muzeo

Ĝia oficiala nomo estas “Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo”. Sed kutime oni nomas ĝin simple Esperantomuzeo. La sidejo estas Palais Mollard, proksime al Reĝa Palaco, la centro de Vieno. Ĝi estas mondfama muzeo, ĉar tia Esperanto-specifa muzeo troviĝas tre malofte en la mondo.

Laŭ la ekstera aspekto, ĝi havas nur tri ĉambrojn kaj la ekspoziciataj materialoj estas malpli ol cent. Tial oni povas opinii ke ĝi estas malgranda muzeo. Sed ĝia funkcio estas sufiĉe grava, ĉar ĝi havas alian stokejon en la supra etaĝo, kie oni akumulis multe da Esperanto-rilataj libroj, gazetoj kaj aliaj presaĵoj. Ĝi ne estas publike malfermita, sed oni povas mendi respektivan volumon kaj propraokule vidi aŭ kopii ilin.

Lastatempe la muzeo komencis publikigi skanitajn bildojn de ties posedaĵo en interreto. Tial oni povas facile trovi ilin ĉie en la mondo. Precipe malnovaj materialoj, ekz. La Unua Libro, estas tre raraj kaj valoraj. Ĝia interreta adreso estas:

<http://www.onb.ac.at/ev/collections/esperanto/18650.htm>

2. Busto de Zamenhof

Apud la Reĝa Palaco, en Karlsplatz, staras busto de Zamenhof. Tiu parto estas alie nomata Esperanto-Parko. Tie staras busto de Zamenhof. Karlsplatz estas unu granda parko en la mezo de Vieno. Staras tie dekoj da bustoj eminentulaj. Unu el ili estas Zamenhof. Sur ĝia bazo mi legis ke ĝi estis fondita de “Esperantomuzeo en Hofburg”. Fakte en la jaro 2005 Esperantomuzeo translokiĝis de Hofburg al nuna Palaco Mollard. Do tiu ĉi busto estis fondita antaŭ la translokiĝo.



3. Zamenhof-Strato

Ĉe la orienta ekstremo de Vieno oni trovas kvietan strateton nomatan Zamenhof. Ĝia longo kaj larĝo estas ĉirkaŭ 300m kaj 6m, do sufiĉe malgranda strato. Tie oni trovas stratosignon montrantan la nomon de Zamenhof-strato. Kial la stratnomo estas Zamenhof? Mi serĉis ties originon en interreto sed trovis nur ke Zamenhof estas aŭtoro de la internacia lingvo Esperanto.

Kiel glatigi malglataĵojn en Sapporo

Sibayama Zyun'iti

La 99-a Japana Esperanto-Kongreso okazis sub serena ĉielo de Sapporo, oktobre, kaj ni certe ĝuis la varman atmosferon de samideanoj... sed malantaŭ la kuliso estis

diversaj malglataĵoj, kiujn la organizantoj penis iel glatigi. El ili mi prezentas epizodojn, kiujn mi koncernis.

1. ne-veno de prelegonto

En la Kongreso estis planitaj 3 prelegoj de alilandanoj, sed ĉiuj ne povis viziti la kongresejon. Du el ili fariĝis alispecaj programeroj, sed unu estis farita de anstataŭa preleganto. S-ro Sergey ANIKEEV, ruso loĝanta en Hakodate, estis petita fari prelegon pri "Fora Oriento de Rusio kaj privataj pensoj pri la natur-ekspluato ĝenerale". La temo estis petita de la Loka Kongresa Komitato (LKK), konforme al la kongresa temo: Ni interparolu pri verda naturo en verda lingvo! Sed en la 3a de oktobro, nur 3 tagojn antaŭ la Kongreso, li informis al LKK, ke li ne povos veni al la kongreso, en iuj ajn el la 3 kongresaj tagoj. Relativa feliĉo estis, ke la plena teksto de la prelego jam alvenis al LKK.

Tuj okazis intensa perreta konsiliĝo de la koncernatoj, kaj kvankam mi mem ne estas LKK-ano, mi kiel estrarano de JEI estis implikita en la afero. La farita decido estis, ke mi anstataŭlegos la manuskripton, kaj s-ro HOŜIDA Acuŝi interpretu japanen. Leviĝis tamen kelkaj problemoj.

Unu el ili estas la longeco de la teksto. La origina teksto estis tiel longa, ke unu persono uzu plenajn 80 minutojn, sed oni devis preskaŭ duonigi, ĉar estas interpretado. Mi tial aŭdacis duonigi la tekston, kaj komunikis tion al s-ro Hoŝida. Mi laŭeble restigis parton kun enhavo nekonata al japanoj.

Alia problemo estis pri bildoj. S-ro Anikeev pretigis en-komputilajn bildojn por montri, sed tio temis ĝenerale pri la naturo en la Fora Oriento, kaj ne estas rekte ligitaj al la enhavo, por montri bildon post bildo laŭ la iro de la prelego. Nu, la

prelego mem estas dividebla en 3 partoj, nome: (1) Fora Oriento kaj ĝia belo, (2) Natur-protektado kaj ĝiaj problemoj, kaj (3) Problemoj de gasdukto kaj naturo. Do la bildoj estu prezentitaj unu post la alia post (1), ĉar temas pri la naturaj belaĵoj de la Fora Oriento, ĝia faŭno kaj flaŭro. S-ro YOKOYAMA Hiroyuki rearanĝis la bildojn kaj portis ilin en sian komputilon.

Tiel estis farita la prelego. Ĉu tio estis sukcesa?


2. foriro de la premiaj dokumentoj

En la Ferma Soleno, s-ro SUZUKI Keiichiro, la prezidanto de JEI kaj de la Kongreso, devus transdoni la premian dokumenton kaj premian monon al la premiitoj de Premio Osaka kaj al tiuj de la Literatura Konkurso. Certe s-ro Suzuki donis aŭtografian subskribon al la dokumentoj, kaj la solenaĵo irus glate... Sed 5 minutojn antaŭ la komenco, oni ne trovis la premiajn dokumentojn. Fakte, s-ro ISINO Yosio, la direktoro de JEI, erare enpakis ilin kune kun la nevenditaj libroj, kaj jam forsendis ilin. Feliĉe la premia mono restis ĉeloke. Tial mi, prezidanta la Ferman Solenon, tuj konsilis kun aliaj, kaj decidis, ke ni petu pardonon de la premiitoj kaj enmanigi al ili nur la premian monon. Sur la premia dokumento estis klare skribite, pro kiu literatura verko, la premiito de la Literatura Konkurso estis premiita, kaj s-ro Suzuki devus laŭtlegi tion. Sed la koverta de la premia mono ne havas tian skribon, tial mi legis tion el la kongresa libro, kaj s-ro Suzuki nur transdonis. Tiel estis farite. La organizantoj petas pardonon pri tio.

RAPORTO



En la 18a de septembro, Pola Retradio (<http://retradio.posterous.com/>) prezentis pri la septembra n-ro de nia gazeto "Novaĵoj Tamtamas", kaj menciis i.a. pri ges-roj Doi en la Hanoja UK kaj s-ro Aida Kiyoshi tradukinta japanan novelon.



BELETRO

verkis Ogaŭa Mimei
esperantigis AIDA Kiyoshi

Ĉapitro 3

Dum Kej bone dormis, iu ŝajnis skui kaj veki lin. Kiam surprizita Kej ekstaris malfermante siajn okulojn, jam vesperiĝis. Kaj la blua lumo de la luno kolorigis la ĉirkaŭon malvarme.

“Kioma horo nun estas? Kian stultaĵon mi faris! Mi ne povis elteni, kiam mi fariĝis dormema” – bedaŭris Kej.

Li deprenis sian ĉapon falintan tie kaj metis ĝin sur la kapon. Kiam li rigardis ĉirkaŭen, iu avĉjo staris apud li portante grandan sakon surŝultre. Rigardante lin Kej konfirmis, ke tiu, kiu vekis lin estis la avĉjo. Li senhezite alproksimiĝis al la avĉjo. Kej observis la avĉjon en la lunlumo. Li portis ĉifonan veston kaj eluzitajn ĉifonajn ŝuojn. Li aspektis tre maljuna kun blanka longvanĝhararo. “Kiu estas vi?” – demandis la knabo en forta voĉo. Tiam la avĉjo alproksimiĝis kun pezaj piedoj al Kej. “Estis mi. Mi vekis vin! Mi petas helpon de vi. Vere mi konstruis ĉi tiun dormeman urbon. Mi estas la estro de ĉi tiu urbo. Sed mi estas tre maljuna kiel vi rimarkis. Do mi petas helpon de vi. Bonvolu akcepti mian peton” – la avĉjo alparolis al la knabo. La avĉjo petis lin tiel fervore, ke Kej devis plenumi lian peton kiel viro. “Se mi povus, mi farus ion ajn.” Kej promesis tion al la avĉjo. Aŭdinte tion la avĉjo estis tre ĝoja.

“Finfine mi trankviliĝis. Do, mi parolos al vi. Mi loĝas longatempe ĉi tie. Sed novaj homoj venis ĉi tien el ie kaj ili tute rabis de mi tutan teritorion. Ili konstruis sur mia teritorio fervojajn trakojn, veturigis ŝipojn kaj konstruis telegrafreton. Iam ne troveblus sur ĉi tiu terglobo eĉ unu arbo aŭ floro. Mi delonge amas ĉi tiujn belajn montojn, arbaron kaj kamparon. Se la homo ne sentus lacon kaj la bezonon ripozi, la terglobo iam fariĝus dezerto. Mi kunportis en la sako la sablon de laco de laca dezerto. Mi portas la sakon surŝultre. Se vi ŝutos sablon sur ion ajn, ĝi subite putros aŭ rustiĝos aŭ laciĝos. Mi disdonos al vi la sablon en la sako. Vi ŝutu iom da sablo kie ajn en la mondo.” – la avĉjo tiel petis Kej.

Ĉapitro 4

La knabo akceptis strangan peton de la avĉjo. Kaj li vojaĝis en la mondon portante la sakon. Iun tagon kiam li paŝis en la alpoj, antaŭ liaj okuloj aperis neesprimeble bela pejzaĝo. Tie troviĝis kelkcent terlaboristoj kaj trakmetistoj. Ili konstruis fervojon hakante antikvajn arbojn kaj frakasante gigantajn rokojn per dinamito. Tie la knabo elprenis sablon el la sako kaj ŝutis ĝin sur la jam konstruitajn relojn. Tiam ŝtalaj reloj blanke brilantaj tuj ŝanĝiĝis en ruĝe rustajn relojn.

Aliokaze kiam Kej promenadis en kaose homsvarma urbo, la aŭto veturanta de la kontraŭa flanko koliziis kun komizknabo kaj preskaŭ mortigis lin. La aŭto senhalte estis forveturanta, kaj Kej elprenis sablon el la sako. Apenaŭ li ŝutis ĝin sur la radojn, la aŭto haltis. La homsvarmo facile povis kapti la impertinentan veturiganton de la aŭto.

Iun tagon kiam Kej preterpasis la lokon de terkonstruo, multe da laborantoj lace kaj trempe ŝvitis. Rigardante ilin Kej kompatis ties malfeliĉon kaj ŝutis tre malgrandan sablon sur la korpon de kontrolisto. Tiam li tuj fariĝis dormema. “Ĉiuj ripozu!” – diris la kontrolisto kaj dormegis evitante la sunon per sia ĉapelo.

Kej vojaĝis per trajno aŭ per ŝipo kaj iris al feruzino ŝutante sablon ĉie ajn. Finfine la tuta sablo eluziĝis.

“Kiam la sablo eluziĝos, denove revenu ĉi tien. Tiam mi faros vin la princo de ĉi tiu lando.” Kej rememoris la vortojn de la avĉjo, kaj ekvojaĝis al la dormema urbo.

Post kelkaj tagoj li atingis la urbon. Sed nenia postsigno de grizaj konstruaĵoj, kiujn li antaŭe vidis estis trovebla. Kontraŭe tie vicis grandaj konstruaĵoj kaj ne nur la fumo leviĝis ĝis la ĉielo, sed ankaŭ aŭdiĝis bruo el feruzino. Kaj elektraĵ dratoj estis teksitaj kiel araneaĵo kaj tramoj veturadis ĉiudirekten.

Vidante ĉi tiun scenon la knabo ne povis levi la voĉon kaj surprizite fiksas grandajn okulojn por admiri kaj fikse observi ĝin.

(fino)